

kontakto



N-ro 1
Volumo 7/1970

PANON KAJ SCION!

Fot. J. Wojciewski

ESTRARO DE TEJO

Humpnrey Tonkin, prezidanto,
2131 Tryon Street, Philadelphia,
Pa. 19146, Usono.

Hans Michael Maitzen, unua vicprezidanto, Laerheidestr. 28, D-463 Bochum, FR Germanio.

Hans Bakker, vicprezidanto, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z., Nederlando.

Andrzej Grzebowski, vicprezidanto, M. Curie-Sklodowskiej 10/3, Bydgoszcz 9, Pollando.

Senad Ćolic, ĝenerala sekretario, Halilbaŝića 23, Sarajevo, Jugoslavio.

Ulla Luin, kasistino, Mygdalsvägen 123, S-13500 Tyresö, Svedio.

Renato Corsetti, vicsekretario, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio.

Ingrid Carlsson, Linderbergsgatan 4, S-85247 Sundsvall, Svedio.

Marian Dobrzyński, L. Staffa 8/18, Warszawa, Pollando.

Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57, D-5161 Merken, FR Germanio.

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

Argentino : Bv. Oroño 866 „A”, Rosario

Aŭstralio : I. Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia 3155 Vic.

Aŭstrio : H. Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz.

Belgio : P. Peeraerts, Drakenhoflaan 97, Deurne-Antwerpen.

Brazilo : Caixa Postal 18-ZC 00, Rio de Janeiro.

Britio : M. Reed, MAP, University of East Anglia, Norwich NOR 88C.

Bulgario : p.k. 587, Sofia C.

Francio : JEFO, 34 rue de Chabrol,

Germanio : Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.

Grekio : Agiu Meletiu 54, (814) Athinai.

Hispanio : S. Aragay, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14.

Hungario : Kenyérmezo u. 6, Budapest VIII.

Italio : Via Po 7, I-10124 Torino.

Japanio : Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, Tokyo.

Jugoslavio : Amruševa 5/1, Zagreb.

Koreo : Internacia P.O. Kesto 1232, Seoul.

Madagaskaro : B.P. 1399, Tananarive.

Meksikio : Lauro Aguirre 243-3, México 17, D.F.

Nederlando : J. Duijs, Schoolstraat 96, Bergum (Fr.)

Novzelando : P.O. Box 40-181, Upper Hutt.

Pollando : Jasna 6, Warszawa 1.

Svedio : T. Janssen, Bjässevägen 1 B, S-71200 Hällefors.

KARAJ GELEGEANTOJ

La sepdeka jaro estas la sepa por „Kontakto”. Tiu ĉi numero estas la sepa, sub mia redakto. Koincido de „sepoj” estas bonaŭgura. Ja nombre sep estas tiu, kiun akompanas bonŝanco. Ĉu ne? Tamen ne zorgante speciale, ke semajno konsistas el sep tagoj, ke en la kapo troviĝas sep malfermajoj, ke dumlonge oni konis nur sep planedojn, ke ekzistas sep mirakloj de la mondo, sep fratoj de Lara, ktp - ni ĝoju tamen, ke „Kontakto” allogis al si sep konstantajn kunlaborantojn: Arianne Durand el Francujo, Jonathan Pool el Usono, Sten G. Johansson el Svedujo, Zlatko Tišljär el Jugoslavio, Halina Matsumoto kaj Mariusz Dastyk el Pollando kaj fine la sepa, aparte menciinda pro la reguleco de la kontribuado, Hans Michael Maitzen el Aŭstrio, unusola cetere kunlaboranta verke kun „Kontakto” estrarano de TEJO. Ĝojante pri tio, ke la redakcio rompis izolitecon de la redaktoro, kiu foje devis verki la numeron ekde unua ĝis la lasta paĝo, mi samtempe petas la aliajn skribemulojn. Kontakto estu redaktata de ni ĉiuj, ĉar nur tiam ĝi respegulos la deziratan nivelon.

Mi ŝuldas al P.T. (Pleno Titulo) Gelegantoj kelkajn informojn pri nia revuo. Ĝi aperas en la eldonkvanto de 1600 ekzempleroj. El tiu kvanto estas distribuitaj 1200 ekzempleroj. La revuon ricevas 145 junularaj membroj-abonantoj de UEA, 143 membroj-abonantoj kun Kontakto, 244 abonantoj. La resto estas aŭ vendata pokvante aŭ sendata interŝanĝe. „Kontakto” laŭforme estas sufiĉe luksa, kion ni tamen atingas laŭ tre favoraj kondiĉoj. Nun ni tamen staras antaŭ dilemo aŭ ŝanĝi la formon (multobligado) aŭ pligrandigi la abonantojn. 100 novaj abonantoj ebligis forte ekstarti sur la tero al nia revuo.

Roman Dobrzyński




Panon kaj scion

La egipta vilaĝo El Amagi troviĝas proksime al Aleksandrio. Al tiu ĉi fakto ĝi dankas sian relativan bonstaton, kies okulfrapa simptomo estas fundamenta lernejo funkcianta jam sep jarojn. En ses klasoj lernas 300 infanoj. Pluraj el ili marŝas ĉiutage eĉ 10 kilometrojn el la beduinaj tendaroj al la lernejo. Kaj tio estas tamen sukceso. En la jaro 1948 en Egipto 80% de la loĝantaro kapablis nek legi nek skribi. Dum la lastaj dek jaroj oni konstruis ĉirkaŭ unu mil novajn lernejojn. Rezulte kvar milionoj da infanoj trovas por si la lernejbendojn. Tamen unu miliono plue ne havas ŝancon lerni. La problemoj troviĝas ne nur en la malfacilaĵoj ligitaj kun la konstruado de lernejoj, eĉ pli ĝena estas manko de instruistaro. En la lando, kie scio estas deficitita, instruisto facile trovas alian okupon pli enspezigan ol

instruado, dume la gigantaj penoj de la ŝtato, kiujn postulas la konstruado de la nova klerig-sistemo ekde la fundamentoj, malebligas provizi la instruistaron per la salajroj, kiun ili meritas. Rezulte la prestiĝo de la profesio estas sufiĉe malalta. Foje instruistoj kaŝas sian okupiĝon en lernejo kaj afektas poŝtalicistojn aŭ eĉ kelnerojn. Kompreneble tio prezentas nur flankan aspekton de la tuta grandega problemoj de la edukado. Apartenas al ĝi la klopodoj kun la instruado de la knabinoj. Ili iom post iom elŝiriĝas al la suno, sed tamen aktuale en la mezlernejoj lernas nur 80 mil knabinoj dume la Araba Unuiĝinta Respubliko havas 32 milionoj da loĝantoj. Okaze de la „Jaro de Edukado“ UAR planas plistreĉigi la penojn akcelantaj certigon de la fundamenta klerigo al ĉiuj infanoj.

La 17-an de decembro 1969

Ĝenerala Asambleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1970 - Internacia Jaro de Edukado. La studo de UNESCO „Analfabetismo en la mondo duono de la XX jarcento“ montras apokalipsan bildon de la situacio en la sfero de la klerigo. Evidentiĝis, ke analfabetoj konsistigas 44% de la homaro pli aĝa ol 15 jaroj. En la mondo vivas do preskaŭ unu miliardo da analfabetoj. Se oni kalkulas laŭ la kriterioj de tiel nomata alfabetismo funkcia prikonsiderante ne nur la scion skribi kaj legi sed ankaŭ kapablon ludi utilan rolon en la socio - evidentiĝas, ke analfabetoj formas 65% de la homoj pli ol 15-jaraj. Ĉirkaŭ 250 milionoj da infanoj tute ne frekventas lernejojn. Laŭ la iniciato de UNESCO en la programo de la Speciala Fonduso kaj la Fonduso de Teknika Helpe de UNO kaj pluraj internaciaj organizaĵoj



La fotoj (El Agami) de la aŭtoro.

ektroviĝis la planoj de konkreta helpo al malevoluintaj landoj. Rezulte de tiu helpo ekzemple en Latinameriko nombro de la lernantoj kreskis je 10 milionoj sole dum la jaroj 1958-63.

La kunlaboro de la ŝtatoj membroj de UNO en la sfero de klerigo manifestiĝis en la organizado de la regionaj konferencoj de klerigministroj. En la jaro 1965 okazis en Teheran sub aŭspicioj de UNESCO tutmonda konferenco de klerigministroj kie oni tute klare emfazis la neceson ligi alfabetizadon kun la ekonomia evoluo de la unuopaj landoj. La konferenco de la Europaj klerigministroj okazinta en Vieno en la jaro 1967 montris, ke ankaŭ evoluinta Europo havas gravajn eduk-

problemojn. Generale en la mondo la krizo pliprofundiĝas. Determinas ĝin antaŭ ĉio demografia eksplodo, speciale en la landoj de la Tria Mondo. Rezulte dank' al grandaj streĉoj la procento de la analfabetoj tamen ilia nombro absoluta minimume malgrandiĝas, sed konstante kreskas. Cetere ne sufiĉas nur certigi la benkon en la lernejo, oni devas ankaŭ certigi utiligon de tiu benko. En Afriko sep infanoj el ĉiu dekopo forlasas lernejon antaŭ sesa lernjaro. Kroma problemo estas neceso de konstanta modernigado de la lernprogramoj, instrurimedo kaj edukmetodoj. La lernejoj, eĉ se lil ekzistas, postrestas post la rapida evoluo de la vivo.

Laŭ la ĝenerala direktoro de UNESCO René Maheu tasko de la Internacia Jaro de Edukado estas integriĝo de la fortoj de la ŝtatoj kaj de la internacia socio cele esplori la aktualan situacion en la mondo koncerne la klerigon, pliperfektigon de la klerigsistemoj, pligrandigon de la klerigbuĝetoj, pliintimigon de la internacia kunlaboro en la sfero de edukado. Unuvorte temas pri mobilizo de la energio kaj stimulo de la iniciatemo koncerne edukadon. Specialan atenton oni turnas al la funkcia alfabetizado de plenkreskuloj, al samrajteco de la virinoj, al ĝenerala demokratigo de la klerigo, al neceso adapti la klerigsistemojn al la bezonoj de la nuntempa mondo, al la formado de la instruistaro, al la esplorado de la instrumentadoj, al la ideo de la tutmonda interkompreniĝo.

Dum la jaro 1970 okazas multnombraj konferencoj, seminarioj, diskutoj pri la problemoj de la klerigo. Surbaze de la kolektita materialo UNESCO prilaboros kritikan aprezon de la stato de klerigo en la nuntempa mondo. Konforma raporto estos prezentita al la Ĝenerala Asambleo de UNO, kiu sekve prezentos al la ŝtatoj membroj respektivajn rekomendojn koncerne edukadon.

La konata angla verkisto H. G. Wells difinis la historion de la homaro kiel „vetkuro inter klerigo kaj katastrofo”. Tiun vetkuron la homaro kapablas gajni, sed estas necesa mobilizo de ĉiuj fortoj. Alikaze atendas nin katastrofo. La edukado formas nedisŝireblan elementon de la ekonomia evoluo. La homaro neniam liberiĝos de la malbeno de malsato, se ĝi ne sukcesos plialtigi sian eduknivelon, ĉar pano kaj scio iras pare.

Dume la homaro prezentiĝas senprudente malavara, se tiaj vortoj sufiĉas por difini la tragikan vetkuron de la armigado - rekte al la katastrofo. La raketsistemo ABM kostas 8 miliardoj da dolaroj, sed ĝi jam estas konsiderata malnoviĝinta. Pere de tiu sumo oni povus certigi lernejojn al ĉiuj infanoj de Afriko.

La problemoj de la edukado estas aparte gravaj por la

esperanto-movado. La disvastigado de esperanto ligas sin nedisŝireble kun la monda evoluo en la ekonomia kaj eduka sferoj. Banala estas la konstato, ke esperanto povas disvastiĝi nur se ekzistas bezono de la interkompreniĝo en la sfero internacia, se la homoj sentas neceson interkomunikiĝi. Sed tiu ĉi bezono staras sufiĉe malalte en la bezonkierarkio de la homo. Superas ĝin la bezono satmanĝi, kovri la korpon, havi tegmenton super la kapo kaj liton por dormi. Ni konsideru, ke nur laŭ tiu ĉi vidpunkto du trionoj da homaro indiferentas rilate al esperanto. Por la analfabetoj esperanto ne ekzistas.

Jerzy Wojciewski



Neutraleco

man Dobrzynski

La esperanta movado stagnas. Pravas tion detruigaj disputoj de la „pacaj batalantoj” en al lanadaj kaj internacia sferoj. Kaj la cetera mondo traktas nin indiferece. Ĉu eble ne pro tio, ke ni dumlonge traktis la mondon indiferece? Simila demando eĥas de la Deklaracio de la 25 Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazinta aŭguste 1969 en Tyreso (Svedujo). Ĉu ankaŭ esperantista junularo ribelas? Ĉu ĝi subfosas la ideologian unuecon de la movado? Dume ni konscias, ke ĵu pli grandaj ideologiaj malakordaĵoj, des pli granda diserigo de la fortoj kaj des pli malfortaj efikoj de la agado.

Ni rigardu en la bazan dokumenton de la movado - **Deklaracio pri Esperantismo** - akceptitan en la jaro 1905 en Boulogne s.M. fare de la I Universala Kongreso de Esperanto. „La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo

kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondecas”.

La esencon de la problemo entenas la unua frazo.

Surbaze de la Bulonja Deklaracio oni povas konstati, ke la celo de la esperantista movado estas alkonduki al tio, ke esperanto fariĝu universala rimedo de la internacia interkompreniĝado.

La universaleco de la lingvo signifas, ke devus ĝin uzi ĉiuj homoj en ĉiuj rilatoj de la internacia sfero. Sobre pensis la esperantistoj en Bulonjo: ĉiuj homoj, ĉiuj rilatoj. Oni ne rezervis la lingvon por iuj homoj en iuj rilatoj. Oni traktis esperanton funkcie, kiel rimedon kaj ne celon. La esperantistoj de Bulonjo estis liberaj de iu ajn sekteco, vidis la aferon universale.

Indas emfazon la prudento de la Bulonja Deklaracio, ĉar ja tiutempe penetradis la esperantistaron „la interna ideo”. Unue ĝi aperis en la literaturaj ĉefe de la rusaj esperantistoj kaj respegulis akutajn konfliktojn interne de la socio kaj nacioj de

la cara imperio. Sekve la interna ideo ekregis la internacian esperantomovadon. Ĝia esenco estis strebi al interfratigo de la nacioj sur la grundo de la internacia lingvo. Ĉe la fundo de la interna ideo kuŝis la konvinko, ke la fonto de la malakordaĵoj inter la popoloj estas diverslingveco. El tiu ĉi supozo sekvis la fido pri eksterordinara povo de la lingvo internacia, kiu per la fakto mem de ĝia enkonduko en la vivon rezultigus interfratigon de la homaro. La erarecon de la supraj konvinkoj oni eĉ ne devas pruvi, ĝi rezultis el nekono de la leĝoj laŭ kiuj evoluas socioj, sufiĉas mencii iujn ajn ekzemplojn: la komuna lingvo ne ekskluzivigis la militon inter la Prusujo kaj Austrujo (1866), burĝajn kaj socialistajn revoluciojn, la civilan militon en Hispanujo (1936-39) ktp.

La interna ideo havis siajn praktikajn konsekvencojn: esperanto rajtis esti uzata nur por la noblaj celoj. Ne plu do temis pri „ĉiuj homoj kaj ĉiuj rilatoj”, sed pri la „bonaj homoj kaj bonaj celoj”. Tiu provo enfermi la lingvon internacian en la limojn de bono kontestis la postulon de la universaleco, dume esenca valoro de la lingvo internacia devas esti universaleco. Dro Zamenhof esprimis tion en la jena frazo: „La materia uzanto de Esperanto estas la tuta mondo, ĉiu akorde al sia deziro povas eldoni en Esperanto kaj ankaŭ pri Esperanto ĉiujn ajn verkojn kaj uzi la lingvon por ĉiuj eblaj celoj”. Sed la sama dro Zamenhof diris ankaŭ jene: „Dotas nin per entuziasmo la interna ideo de Esperantismo, kiun ni sentas ĉiuj en niaj koroj, ĉar ni sentas la spiriton de la homa frateco. Esperanto plaĉas al ni ne tial, ke ĝi interproksimigas la homajn korpojn kaj mensojn, sed nur tial, ke ĝi interproksimigas iliajn korojn”. Dro Zamenhof komprenis la signifon de la interna ideo en tiama evoluetapo de la lingvo kaj de la movado. „Tiu interna blovo - skribis



La partoprenantoj de la 25 IJK en Tyreso manifestacias en la stratoj de Stokholmo.

prof Edmond Privat en „Historio de la lingvo Esperanto” - donis al la lingvo flugilojn kaj ebligis, ke ĝi ne estu artefarita sistemo, sed fariĝu vere nature vivanta lingvo”. Sed la interna ideo estis ankaŭ elemento de tiama taktiko de la movado. Esperanto pro la minimuma evoluo dum longaj jaroj havis neniun praktikan signifon. Propagandado de la praktika flanko de la internacia lingvo ne povis renkonti pli vastan reeĥon, speciale inter la socioj, kies lingvoj per siaj influoj for transpasis la limojn de la propraj landoj. La kunligo de esperanto kun la granda ideo de interfratigo de la homaro havis do en la periodo de la XIX-jarcentaj utopioj gravan propagandan signifon, ĉar ĝi altiradis al la movado homojn pretajn al ĉiu ofero. Dank'al tiaj homoj la internacia lingvo transdaŭris la periodojn de la humiligilo, de internaj krizoj kaj persekutoj. La totala atako kontraŭ la interna ideo estas malĝusta, eĉ stulta, ĉar siatempe ĝi plenumis tre gravan pozitivan rolon en la disvastigado de la lingvo internacia. Tamen oni povas konsideri naiva la opinion publikigitan en la freŝe eldonita libro: „Ekrigardu al la homoj de la 2000 jaro, aŭ pli bone aŭskultu ilin. Apud la gepatra lingvo ili uzas Esperanton. Ĉiuj parolas la saman lingvon. Ĉu vi pensas, ke tiam ili batalos unu kontraŭ alia. „La redaktoroj el la Germana Esperanto Junularo nomus tiun ĉi frazon talpaĵo. Paranteze dirite - por atingi la staton, ke ĉiuj homoj de la 2000 jaro parolu esperanton estus necese tuj ekde hodiaŭ instrui la lingvon internacian al 200 milionoj da homoj ĉiujare. La interna ideo permesis firmiĝi al la esperantista movado, sed ĝi samtempe provizis la aferon per la trajtoj de kasteco, fermiteco. „La rondo familia” logis idealistojn, sed igis indiferenta la ceteran publikon. Louis de Beaufront, kiu same multe kontribuis al la venko de esperanto, kiel al ĝia pereco, kontraŭstaris la internan ideon, ĉar ĝi suspektigis la oficialajn ŝtatajn rondojn rilate al esperanto. Dume Beaufront aprobis nur oficialan vojon de disvastigo de la lingvo internacia. La posta sinjoro Ido estis do la unua, kiu riverencis antaŭ la politiko, sed ne la lasta. Esperanto-movado dum tuta sia historio devis koncedi al la politiko des pli multe ju pli forte la mondo dividiĝis ideologie. Ne malaperis ankoraŭ la interna ideo, kiam oni komencis paroli pri neŭtraleco de la esperanto-movado.

La neŭtraleco trovis sian ekstreman, preskaŭ absurdan, esprimon en la statuto de UEA kaj sekve en tiu de TEJO, kiuj deklaras neŭtralecon rilate al la naciaj, rasaj, religiaj, politikaj problemoj. La statutoj deklaras krome la neŭtralecon rilate al ĉiuj sociaj problemoj. El tiu ĉi konstato oni povus konkludi, ke UEA kaj TEJO ne rajtas eĉ okupiĝi pri la demando de la internacia interkompreniĝo, ĉar tio estas ja ankaŭ socia problemoj. Kion do rajtas fari la esperanto-movado? Laŭ la statuto nenion, ĉar ĉiukaze estus ofendita la neŭtraleco. Feliĉe la movado estas multe malpli neŭtrala ol oni deklaras.

Kaj kio estas neŭtraleco? Ĝi signifas indiferenton rilate al kontraŭstaraj opinioj aŭ egalan traktadon de ili. Plurdirekta aktivado de la esperanto-movado, ĝia universaleca ce'lo, ne permesas al ĝi favori iujn konceptojn politikajn, konvinkojn religiajn unuvorte ĉiujn ideojn kaj fenomenojn, kiuj dividas la homojn, ĉar esperanto-movado povas ekzisti nur surbaze de tio, kio ligas homojn kaj ne de tio, kio ilin kontraŭstarigas. Neŭtraleco ne montras la vojon irendan, sed montras la vojon, kiun oni ne iru. Ĝi havas do



Claude Nourmont, Fraulino Esperanto 1969, elektita en Tyresö.

negativan karakteron. El neŭtraleco ne rezultas pozitiva programo de agado, ĝi mem estas programo de neagado. Ju pli neŭtrala oni estas des pli forte oni ligas siajn manojn, des pli oni limigas la sferon de la agado. Absoluta neŭtraleco signifas kompletan neagadon. Oni povas esti neŭtrala nur eriu difinita direkto. La direkto de neŭtraleco dependas de la cirkonstancoj. Neŭtraleco estas metodo kaj ne celo, ĝi apartenas al la taktiko. Kvazaŭ ne memorante pri la taktika signifo de neŭtraleco oni dotis ĝin per preskaŭ sakraj ecoj, tiel ke ĝi fariĝis en la esperanto-movado tabuo, iu nova versio de la interna ideo.

Kompreneble oni devas konscii, en kiu mondo oni vivas. Ĝi estas mondo, en kiu eĉ tago ne pasas sen eksplodo de bomboj, ĝi estas mondo, kie okazas senbomba, sed ankaŭ senkompromisa

ideologia batalo. UEA kaj TEJO havus nelongan vivon, se ili favorus elektitan popolon, se ili pledus por unu el la sociaj ordoj. Necesas forte substreki, ke esperanto-movado estas unu el kelkaj internaciaj movadoj, kiuj ne dispartiĝis en du blokoj dum la malvarma milito. Tion oni danku al strikte observata politika neŭtraleco. La renaskiĝo de la movado en la socialismaj landoj en la kvindekaj jaroj pravas ankaŭ pri la prudenta taktiko de UEA. Sed tamen la taktiko devas ŝanĝi ĝi konforme al la ŝanĝoj okazantaj en la mondo, devas do ankaŭ modifiĝi la neŭtraleca dogmo.

La faktoj estas tiaj, ke ili staras sufiĉe malproksime de la statutaj konstatoj pri la neŭtraleco. Mi ne sukcesis partopreni iun neŭtralan esperantokongreson, mi legas neneŭtralajn

rovuojn kaj librojn en esperanto. La samo koncernas radiosauĝigojn. Cetere kiu ŝtato elspezus milionojn por la neŭtralaj disaŭdigoj? Ni ne troigu kun la neŭtraleco, ĉar la sukcesoj de esperanto dependas de ĝia utileco kaj ne de neŭtraleco de la movado. Ŝajnas ke esperanto des pli sukcesas ju pli ofte ĝi estas aplikata por la neneŭtralaj celoj. Ni ne havu iluziojn. En la hodiaŭa mondo oni nenion ricevas senpage. Unue oni demandas pri la konkreta utileco de iu ajn afero. Esperanto ne povas esti escepto. Neŭtraleco sendube plenumas sian taskon de defendarmilo. Nia neaktivado en pluraj sferoj de la socia vivo defendas nin kontraŭ la atakoj de ekstere. Sed kion ni gajnas per tio? Kiu ne enmiksigas en la sociajn aferojn, tiu ankaŭ ne ekzistas por la socio. La supraj duboj jam de pluraj jaroj penetras la vicojn de TEJO. Dum la kongreso en Wokingham (1961) kelkaj landaj sekcioj de TEJO laŭ la iniciato de GEJ kaj PEJ subskribis la deklaron, kiu malaŭdace sugestis agi laŭ la principo de „la aktiva neŭtraleco”. Dum la kongreso en Ystad (1965) la sama ideo estis ripetita pli kuraĝe, sed tute klare formulis ĝin

la deklario de la 25 IJK en Tyreso (1969).

La ideoj el Tyreso staras sufiĉe malproksime de la tradicie komprenata neŭtraleco. Oni serĉas por esperantista junularo la lokon inter la monda junularo, kies rolo en la socio ŝanĝiĝas radikale kaj kion pruvas intelekta kaj politika mobilizo de la gejunuloj. La deklario ne nur ne timas enmiksigadon en la politikon, sed simple akceptas politikan vidpunkton de la aprezo de la lingva problemo: „Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacio en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemo, kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato ke la nuntempa fenomeno de detruado de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj ne estas sufiĉe atentata tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de la lingva imperiismo”.

Ni memoru tamen, ke ĉiuj deklarioj estas nenio alia ol vortoj. Verba volant - vortoj forflugas, se ilin ne sekvas praktiko. Ne estas tasko de tiu ĉi

artikolo formuli konkretajn konsilojn pri la agado. Por tio TEJO havas estraron, pli kompetentan ol iam ajn. Interesas min aparte la esprimita en la deklario korelativo inter la esperantista junularo kaj la monda junularo „mobilizita intelekto kaj politike”. Valoras tamen scii, malgraŭ la onidiroj pri la „junulara revolucio”, „junulara fenomeno” ktp. ke verdire ne ekzistas iu kohera monda junulara movado. Aperas diversaj movadoj, spontane ribelas, efemere ekzistas. Oni parolas pri „junulara maldekstro” aŭ „nova maldekstro”, sed fakte ĝi ne posedas iun pozitivan programon, ĝia ideologio estas mozaiko de laŭmodaj opinioj.

La deklario starigas antaŭ TEJO novajn eblecojn, sed ankaŭ novajn danĝerojn. Estas facile elŝiriĝi el la kasteca neŭtraleco, sed tio ne valoras penos, se ĝi kondukos al la senelira strateto de la ŝajna revolucio. Do ni fosu nian sulkon, sed sur la pli granda kampo, per pli moderna maŝinaro, prudente.

R.D.

Fot. Marian Dobrzynski

Dr. LL. Zamenhof
 Varsovio, str. Dzika nro 9. 27/VII-09.

Al Sinjoro
 Dro G. Robin,
 prezidanto de la Rumana
 Esperantista Societo
 en Bukareŝto.

Kara Sinjoro! Volu transdoni mian koran saluton al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso de Esperantistoj en Rumanujo. Mi deziras al la Kongreso plej bonan sukceson.


Dr. LL. Zamenhof

NEKONATA LETERO DE DRO ZAMENHOF

Dr. LL. Zamenhof, Varsovio, str. Dzika nro 9, 27/VII/09.

Al Sinjoro Dro G. Robin, prezidanto de la Rumana Esperantista Societo Bukareŝto.

Kara Sinjoro. Volu transdoni mian koran saluton al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso de Esperantistoj en Rumanujo. Mi deziras al la Kongreso plej bonan sukceson.




Progreso kaj harmonio de la homaro

Mariusz Dastych

Sur altaĵoj de Senri - la antaŭ-urbo de Osaka, kreskis mirinda urbo de la Monda Ekspozicio - „Expo-70”. Super la I- Monda Ekspozicio en Parizo, en la 1889-jaro, leviĝis Turo de Eiffel. La unua Monda Ekspozicio okazanta sur la azia kontinento reliefigas la nuntempan mondon, kiu ja „iom” progresis de post la jaro 1889-.

La Simbola Turo de „Expo-70” estas „nur” 150 metrojn alta. Tri ŝtalaj tubegoj portas strangan spacan strukturon, dominantan super la Simbola Zono, en la centro de la Ekspozicio. La Simbola Zono - koncepto de la mondfama japana arkitekto, profesoro Kenzo Tange, ĉirkaŭprenas „Omatsuri” aŭ Festival-Placon, Teman Halon kaj Teatran Halon, en kiu ankaŭ

Expo '70



povos okazi mitingoj kaj konferencoj. Proksime al la Festival-Placo troviĝas Art-galerio, en kiu dum la daŭro de la Ekspozicio oni kolektos plej elstarajn art-verkojn, Komentante de Henry Moore, nun eble la plej fama skulptisto, ĝis la pentraĵoj de Van Dyck kaj Rubens...

Ni denove rigardu al la Simbo'a Zono. Super ĝia centra parto - la Festivala Placo - etendiĝas giganta diafana tegmento (292 m x 108 m), kies strukturo el

ŝtal-tuboj, pezanta 4.7000 tunojn, estis konstruita sur la tersurfaco kaj sekve suprenigita al la alteco de 30 metroj. La Simbola Zono estas markita per tri turoj - la Sun-turo (60 m), la Partrin-turo (26 m) kaj la Turo de Juneco (30 m). La turoj kun apudaj konstruaĵoj konsistigas la t.n. Teman Spacon, en kiu tri ekspozicioj - subtere, sur la ternivelo kaj supre - enhavos ekspoziciojn, reliefigantajn tri grandajn ĉapitrojn de la homa historio ekde la pratempo, trans la nuntempa epoko ĝis la suproj de la estonteco, al kiu la homaro strebas kaj aspiras. Ĉio kune bildigas la ĉefan temon de la Ekspozicio, kiu estas: la Progreso kaj Harmonio de la Homaro.


El la koro de la Simbola Zono - la Festival-Placo - dise kuras kvar moviĝantaj stratoj, kiuj portas la vizitantojn al kvai pordegoj de la Ekspozicia urbeto, kaj reen - al la centro.

Pli ol 80 ŝtatoj aliĝis al „Expo-70”. Almenaŭ 50 konstruis tie siajn pavilonojn, kiuj reprezentas plej karakterizajn ecojn kaj atingojn de la unuopaj nacioj aŭ multnaciaj ŝtatoj. Krom la ŝtataj pavilonoj, en la Ekspozicio troviĝas pavilonoj de diversaj grandaj entreprenoj - japanaj kaj eksterlandaj, de religiaj organizaĵoj kaj organizaĵoj internaciaj - en kies nombro elstaras la pavilono de UNO.

La Monda Ekspozicio komenciĝas la 15-an de marto 1970 kaj ĝi daŭros 6 monatojn, ĝis la 13-a de septembro en la nuna jaro. Ĝi certe estos unika, same kiel unika estas la moderna Japanujo - la plej granda urbo de la mondo, kiel ofte nomas ĝin ĵurnalistoj.


La Mondaj Ekspozicioj estas ĉiam simbolo de la mondo, kiu estos. Same „Expo-70” permesos iom gustumi la futuron. Ĝi eble diferencas de aliaj per tio, ke la estonteco jam lasis de la Ekspozicio, en Japanujo. siajn spurojn en la lando mem de la Ekspozicio, en Japanujo. Sufiĉas iom promeni en la urbocentro de Tokio, aŭ veturi al Osaka per „Hikari” - la eksprestrajno ĝis nun nenie trovebla.

Viziti Japanujon, ĉu signifas promeni al la XXI-a jarcento?



Pavilono de UNO, antaŭ ĝi etendiĝas la Amikec-placo, kie de sur 600 fostoj iompostiom plialtiĝantaj ekde 2 ĝis 28 m flirtas flagoj de la UNO-membroj.


La 1970-a jaro estas la unua jaro de la 10-jara Evolu-plano de UNO kaj la 25-a jaro de ĝia ekzisto. En la ekspozicio s.t. „Evoluo per kunlaboro” troviĝos i.a. originalaj dokumentoj de la Ĉarto de UNO kaj de la Universala Deklaracio de Homrajtoj, statuoj skulptaĵo el Abu Simbel kaj... aparto por sensaligo de akvo. Interesa ekspozicio estos la Sonorilo de Paco - la donaco de Japana UNO-Societo al la Sekretriato de tiu ĉi organizaĵo. La sonorilo estas fandita el oraj kaj arĝentaj moneroj, kiuj devenas el 70 landoj de la mondo.



La soveta pavilono - ruĝa duoncirklo - simbolas la ŝtatan emblemon de Sovetunio - martelon kaj serpon. Ĝi ŝprucas supren ĝis 100 m kaj kostas 7 milionojn da us.dol. Sub ĝia tegmento troviĝas tri etaĝoj de ekspoziciaj salonejoj, teatro, mod-salono por 600 spektantoj kaj tipa rusa restoracio. La tuta konstruaĵo, grandskale uzanta ŝtaltubojn kaj ŝtalplatojn, simbolas dinamisman energion de la soveta popolo. Ĝi enhavas ankaŭ la ekspozicion, honore al V. I. Lenin - en la 100-a datreveno de lia naskiĝo, festata en la nuna jaro.

La alia giganto - Usono - konstruis pavilonon, kiu aspektas kvazaŭ iu „fluganta telero”. Ĝia tegmento, subtenata per aerpremo, estas nur 13,8 metrojn alta. La tegmenton ĉirkaŭas rondforma remparo, kovrita per torfo. Sub la „telero” (142 m x 83,5 m) troviĝas 9.290 k.m. da ekspozicia spaco. La tegmento estas el vitra fibro, diafana kaj tre malpeza. Tage ĝi enlasos sunlumon kaj nokte lumos mem. La usona pavilono kostas 10 milionojn da dol.





La pavilono de japana konzerno Hitachi similas al „kosma veturilo” (diametro 45 m). Kaj fakte ĝi reprezentas „kosman vojaĝon”. La kupolo el diafana teksaĵo apogas sin sur 22 fostoj.

La ekspozicioj interne ilustras la temon „Serĉado - la invito al nekonatejo”. La vizitantoj prenos lifton ĝis „subĉiela salono” 40 m super la ternivelo. Tie ili pilotos „kosman ŝipon”,

samtempe rigardante „kosman pejzaĝon” trans la fenestroj. La skulptoskizo de la Festival-Placo. Super ĝi videblas la giganta tegmento.



Malkonformema junularo

Sten G. Johansson

Ĉu la junularo estas malkonformema, senkonvencia, konscia kaj kritikema kontraŭ la misaĵoj en la mondo? Aŭ ĉu ekstremisma, senmora, troigema kaj malamika al la socio? Sendube jes. Ambaŭ estas pravaj - almenaŭ koncerne parton de la junularo - kaj la diferenco vorta estas nur esprimo de malsamaj politikaj starpunktoj - la unuan frazon uzus progresulo, la duan reakciulo.

Sed mi faru al la legantaro komplimenton; mi priparolu la junularon nur el la unua vidpunkto - la progresema.

El kio do konsistas la malkonformemo de la junularo? Ĉu ĝi signifas, ke ili estas ego-centraj individualistoj, kiuj ne funkcias kunlabore en grupa komuneco? Certe ne. Ĝi simple signifas, ke la moderna junularo grandparte pridubas la antikvajn regulojn pri la konduto de homoj unuope kaj grupe. Kiel? Nu, mi donu kelkajn ekzemplojn.

Kiam temas pri la konduto individua, la junaj homoj nuntempe montras pli da memstaro ol antaŭe. Laŭ kredindaj atestoj de ekz. instruistoj kiuj vidis plurajn generaciojn de gejunuloj, la nunaj estas pli kuraĝaj diri kaj fari kion ili volas, kaj malpli emaj akcepti la dirojn de tiuj instruistoj nur pro tio ke ili venas „de supre”. Tiuj ĉi atestoj venas ne nur de progresemaj instruistoj (ĉar tiuokaze ili estus malmultaj) sed ankaŭ de reakciuloj.

Iom oni povas vidi jam okule. Ekzemple la vesto de gejunuloj ne ĉiam konformiĝas al la diktato de la kapitalistoj elŭŝantaj sub la pseŭdonimo „modo”. Estas vere ke tiuj modistoj rapide komprenis la malkonformemon de la junularo kaj unue ĝin sekvis, plue rapide ĝin komencis gvidi. Sed inter la trompata junularo estas ĉiam pli multaj kiuj ekvidas tiun ruzon de la kapi-

talistoj kaj komprenas ke establiĝis nova konvencio. Tial oni vidas ĉiam pli da gejunuloj kiuj sin vestas ne laŭmode sed - laŭplaĉe.

Se ni poste vidu kiel oni agas en grupo, mi eble komencu per la plej simpla grupo - la paro. En reakciaj rondoj estas tre ŝatate paroli pri la t.n. „libera amo”.

Kio estas la libera amo, kaj kiom ĝi estas praktikata de la junularo? Nu, oni povas interpreti la esprimon dumaniere. Unue ĝi povas signifi nur, ke oni malakceptas ke burĝaj leĝoj reguligu la rilatojn inter du homoj. Oni malakceptas amon laŭ kontrakto, do la geedzecon, kaj anstataŭe vivas en „konscienca geedzeco”, pri kies validi oni mem decidas. La dua signifo estas pli radikala. Ĝi signifas ke oni neniajn regulojn por la interseksaj rilatoj akceptas. Oni povas vivi pare, kiam tio plaĉas, kaj oni povas praktiki „grupseksan” kaj aliajn novajn formojn de kunvivado. La unua, pli limigita signifo de libera amo ja estas nenio nova. Estante svedo, mi ne povas ne pensi pri la romano „Det gar an”, t.e. „Decas”, de Carl Jonas Love Almqvist, en kiu li pere de la ĉefagantino pledis por seksa kaj ekonomia emancipiĝo de la virino, kaj por al libera amo en ĉi limigita senco.

„Decas” pareis en 1838. Jes, ne estas preseraro, en la jaro mil okcent tridek ok.

La ekstergeedzeca kunvivado ĉiam estis kaj ankoraŭ estas ofta inter la proletoj. Ĝi okazis ĉe laboristoj en la industriiganta Eŭropo, kaj certgrade ĝi ankoraŭ okazas tie. Nuntempe ĝi estas ofta inter la senteraj slumkvartalanoj en la grandurboj de la klase plej dividitaj socioj. Ĝi estas altfrekventa en la favelas de Rio de Janeiro, en la townships de Salisbury kaj Johannesburgo, en la barriadas de Lima. Kial? Ĉu temas pri la ideo ke la proletoj estas la

progresiva forto en la socio? Verŝajne ne. La ĉefa kaŭzo sendube estas pure ekonomia. La viro ne kuraĝas ligi sin por ne devi respondeci pri la virino kaj infanoj. Imagu kiam li perdos la laboron! Kelkfoje povas esti tiel simple, ke oni eĉ ne havas monon por pagi la pastron, kiu geedzigus onin.

Sed se oni serĉas konscian elekton de tiu ĉi formo de kunvivado, elekton bazitan sur klare difinita racia aŭ morala starpunkto, tiam oni devas serĉi inter la edukita junularo de la plej riĉaj landoj. Mi scias malmulte pri la stato ĝenerale, sed inter la studentoj kaj intelektuloj de Svedio la „konscienca geedzeco” lastatempe fariĝas sufiĉe kutima.

La pli avancita libera amo ŝajnas esti tre malamplekse praktikata. T.n. grupa sekso estas iom priparolata en Svedio.

laŭnome - kiu praktikas tian eksperimenton de kunvivado. La plej pristuditaj provoj verŝajne okazis en Okcidenta Berlino, ŝajne ne tro sukcesaj. Poligamio ja estas ofta en multaj kulturoj, en kelkaj eĉ laŭleĝa. Kaj kelkaj kulturoj havis poliandron, t.e. multedzecon ĉe virinoj. Sed ŝajnas esti malfacile kombini poliandron kaj poligamion, verŝajne pro tio ke tiuj sistemoj estas bazitaj sur aŭtoritateco. Kaj libera amo ne povas esti ia reciproka aŭtoritato, sed ambaŭflanka kaj samtempa libereco kaj respekto, ŝajnas ke la homo devos unue lerni tion.

Mi jam transiris de la paro al pli nombra grupo; do mi diru ion pri la grupa konduto en pli ĝenerala senco. Grupa agado ja estas nenio nova, organizoj kaj societoj ĉiam estis unu formo de agado. Sed antaŭe la kluba formo estis preskaŭ sola modelo por grupoj kaj movadoj. Homoj de unu kategorio kuniĝis, oni elektis gvidanton. Poste la estraro plenumis la agadon, faris la decidojn, kelkfoje prezentis aferojn al la membraro, kiu voĉdonis por ĝi aŭ kontraŭ ĝi, kaj poste la estraro faris kion ĝi ĉiuokaze intencis fari. Se iu membro havis ideon, li komencis per „Sinjoro prezidanto” kaj finis per „Dankon pro la parolo”. Se oni volis in-



flui al io en la socio, la estraro fariĝis ia ligilo (legu „izolilo”) al la socio.

La movadoj kiuj estiĝas lastatempe, kaj en kiuj gejunuloj estas ĉefaj partoprenantoj, ne sekvas tiun modelon. Oni rompis tiun ĉi burokratan konvencion. Rezulto estas ke tiuj movadoj ne estas tiel klare difineblaj. Ne estas tiel facile por la sociaj gvidantoj meti la novajn movadojn en certan fakon.

Mi donu kelkajn ekzemplojn de tiaj movadoj. La plej granda kaj unu el la unuaj estas la movado por Vjetnamio, kies ĉefa kaj plej aktiva parto estas - almenaŭ en Svedio - la FNL-grupoj. Alia ekzemplo estas la amasa maldekstra studenta mo-

Japanio, kaj Okcidentgermanio. Tiu movado ŝajnas disfali en multajn ideologie iomete diferencajn grupojn. Tria ekzemplo estas parto de la movado usona por civitanaj rajtoj, kun organizo kiel la Nigraj Panteroj. Unu trajto de la laborformo de tiuj novspecaj movadoj estas nefido je la t.n. reprezenta demokratio kaj peno kiom eble uzi la grandkunvenon kiel decidorganon, kie ĉiuj povas partopreni. Kie la anoj estas tro multaj aŭ tro disaj por ebligi tion-ĉi, oni preferas decentrigitan povon. Ĉiu grupo ene de la movado laboras memstare zorgante pri al kontaktoj kun aliaj grupoj. Tiu ĉi laborformo kompreneble malfaciligas por la establita socio meti la movadon sub klaran ideologian aŭ celan titolon.

Eble mi fine diru ion pri la plej granda grupo - la monda komuneco. Koncerne ĝin, oni povis lastatempe rimarki pli konsekvencajn pensadon ĉe la maldekstraj gejunuloj. Oni oponas kontraŭ tiu burĝa ideo de kelkaj radikalaj liberaluloj kaj multaj socialistoj, ke revolucia linio estas necesa por ĉesigi la ekspluatadon kaj subpremon nur en la malriĉaj landoj, dum en Eŭropo kaj Nordameriko oni devas uzi la metodojn de intertraktoj kaj kompromisoj kun la kapitalistoj kaj iliaj defendantoj. Nuntempe ĉiam pli da gejunuloj komprenas ke oni devas rigardi la mondon kiel unuon; ke necesas komuna ideologio kaj strategio por la tuta mondo.

Ĉu la junularo povas havi veran influon al sia socio, aŭ ĉu ĝi devas nur atendi la formortadon de la maljunuloj? Nu, certe la modernaj gejunuloj dank' al sia pli alta eduko havas pli da potenco ol la junularo havis antaŭe. Sed ekzistas danĝero, ke la edukita junularo eluzos sian nunan kaj estontan povon por propraj intencoj, perdante la kontakton kun la popolo kiel tuto. Ekzistas grupoj, kiuj estas tre neglektataj kaj kiuj havas nenian potencon. Se la junularo forgesos tiajn grupojn - unu ekzemplo estas la infanoj - oni vere povos diri, ke la potenco koruptis ilin, kaj ke kreiĝis nur nova establaĵo.

S. G. Johansson

☆

„Por mi frenezigo entute ne signifis malsanon. Ĝi estis simila al lando de kontraŭa realeco, kie reĝis nelokigebla lumo, kiu blindigis... ne lasante lokon por ombro. Iu mensa spaco sen limo... flata... streĉita vakuo. Ĉio neŝanĝebla, nemovebla. Mi perdiĝis en ĝi apartiĝis. En la centro de izoleco mi estis terure sola.” Jen la konfeso de 24-jaraĝa knabino suferanta skizofrenion.

Skizofrenio estas unu el plej oftaj mensaj malsanoj. Subbaze de genetica verŝajneco oni kalkulis, ke ĉiu centa homo povas esti skizofreniulo. Malgraŭ delonga kono de skizofrenio ĝis nun ardas diskuto pri ĝia deveno. Unu grupo de psikiatroj opinias, ke ĝi estas heredata, alia substrekas destruktivan influon de medio kiel ties ĉefan kaŭzon.

Kiam vi rigardas la suban bildon via unua impresio estas, ke vi renkontis iun „picassan” pentraĵon. Ĝi estas tamen tipa pentraĵo de skizofreniulo. La vizaĝo pentrita sur blua fono estas strange deformita. Jen sur nivelo de la brovoj ĝi subite duobliĝas ekhavante du nazojn kaj du buŝojn. Sur la bildo evidentiĝis karakteriza por skizofreniuloj eco konata kiel dispartigo de personeco aŭ duonigo de memkonscio. Tiun staton plej bone respegulas vortoj trovitaj en memorlibro de malsanulo. „Kien ajn mi turniĝas mi renkontas alian fazon de mi mem. Ĉiu mia penso estas etapo de la persono, kiu estas nun mi. Mi, kiun mi mem ĝis nun ne konis”.

Tre ofte skizofreniuloj perdas kapablon ligi vortan kontakton kun propra medio. Verŝajne pro tio ili sentas urĝan bezonon esprimi sin en ne-vorta maniero, en bildoj. La bildoj alportas multe da valoraj informoj pri la interna mondo de suferantoj. Ili estas direktilo por kuracisto kaj psikologo. Samtempe desegnado devigas malsanulojn precizigi iliajn sentojn kaj imagojn, instruas al ili sin esprimi. Ne malofte tiamaniere oni malkovras originalan pentristan talenton.

Ĝis la fino de XIX jarcento kreaĵoj de skizofreniuloj estis traktataj kiel koleriga flanko

„Alia Kosmo”

Halina Matsumoto

simptomo aŭ objekto de surfaca interesiĝo. Max Simon-franca psikiatro kaj Cesare Lombroso-itala psikiatro kaj samtempe profesoro de krima juro estas tiuj, kiuj unuan fojon analizis kolektojn de skizofrenia arto. Dank' al ili kaj ties konataj posteuloj (Freud, Young) nuntempe ĉiu hospitalo por mense malsanaj gardas kaj utiligas tiun fenomenon, okazas internaciaj konferencoj dediĉitaj al psikopatologio de l'esprimado.

Observante desegnaĵojn de la malsanuloj oni povas paŝo post paŝo esplori kiamaniere la interna mondo krevigas barojn difinantaj limon de ties personeco. Fine venas momento, kiam malsana koncepto pri la mondo inundas eksteran realecon.

Tiam sur la bildoj malaperas realaj proporcioj: Objektoj estiĝas flataj, lumoplenaj aŭ tute senlumaj ĉar al skizofreniulo fremda estas sento de ombro kaj fundo. Sur papero emerĝas dezertaj spacoj, kiuj poste pleniĝas per amaso de plilongitaj objektoj kaj strangaj simboloj.

Paralele al profundiĝo de skizofrenio kraĵo aŭ peniko de la malsanulo ekhavas rolon de rentgena aparato. Ĉiu objekto estas trarigardebla. La fenomeno estas konata kiel „X-radiaj bildoj”. Tiu-specaj bildoj estas karakterizaj ne nur por skizofreniuloj, sed ankaŭ por triboj, kiuj loĝis iam en Aŭstralio kaj Dakoto.


Kiam la malsano plu progresas ĉirkaŭanta skizofreniulon mondo ŝancelas senekvilibre en volvita spaco. Degeliĝanta en ĝi homo malespere serĉas iun firman punkton, kiu protektus lin kontraŭ droniĝo. Sur la bildoj aperas nun klare distingebla linio, lasta peno ordigi kaosan spacon. Ĝi estas nomata la linio de ripozo ĝi kuras en vertikala direkto. Evidentiĝas, ke ĝi estis baza organiza prin-

cipo por unuaj altaj civilizoj (ekz. en Egipto). En la pinta fazo de la malsano multidirekta spaco de skizofreniulo estiĝas kvazaŭ homogenita. Kiel ĝia imago sur la papero aperas nur senordaj koloraj makuloj.

Spontanajn bildojn de mense malsanaj homoj oni povas pritrakti en tri aspektoj: kiel diagnozon, psikoterapeŭtikon kaj en la aspekto de kulturo kaj estetiko.

Oni ofte trovas surprizigan similecon inter bildoj de surrealistoj, kubistoj kaj skizofreniuloj. La komparo estas tamen nur surfaca. Oni ne rajtas forgesi, ke surrealistoj uzis simbolojn por esprimi realecon kaj por skizofreniulo la simbolo estas la sama kiel ĝia signifo. Kubistoj analizis realecon en formo de geometraj rilatoj. Geometreca bildo de skizofreniulo respegulas konkretan por li mondon en tiu formo. Ekzistas ankoraŭ unu baza diferenco. Bildoj de primitivaj triboj same kiel bildoj de modernaj artistoj adresataj estas al la socio. Skizofreniulo estas tamen sola en sia propra mondo. Socio ŝajnas al li fremda kaj danĝera. Por ĝi li ne kreas.

Jam de jaroj oni serĉas respon-



La dio de ĉiutageco
Flavajn dentojn

montras griza tago

Malpuraĵoj

en talaĵa korbo

Patrin' kuŝas

aĉetu manĝon

Silento

paŭzo...

Soleco inter vi

zorge kaŝata

Voksigno: radoj dentaj

vestojn dispremas

Frido senkortaŭsa...

Perditaj en makrokosmo

mikrohomoj

Vane sentas sur orbito

de l'mondeto

Tempon Spacon Senlimon

grandecon eksan



La poeziado de 24-jaraĝa
skizofreniulino

ELEKTRONAJ KALKULILOJ

Hans Michael Maitzen

Elektronaj kalkuliloj estas unu el la plej karakterizaj elementoj de la moderna teknologia vivo, sen kiuj ni ne povas imagi ekzemple la tutan spacveturadon. Por ilustri la manieron, en kiu operacias elektronkalkulilo, jen ni prezentas „fludiagramon”, ellaboritan de studentoj de universitato Marburg (F. R. Germanio). Tiu fludiagramo estas procezanalizo de RENDEVUO.

Formalaj elementoj :



TEJO KAJ LA IMPERIISMO

Io moviĝas en TEJO. Eble ĝi moviĝis dum longa tempo, tamen ĝi longe ne estis atentata de la supraj instancoj de la organizo. Sed nun la vezikoj antingas la supraĵon, kaj la kaĉo ekboletas. Ĉu sufiĉe? Ne, ankoraŭ la kaĉo estas nur duonpreta. TEJO ankoraŭ ne klare difinis sian ideologion.

La deklaracio de Tyreso diras, ke „... oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacio en ĉiu formo...” Ĝi ankaŭ uzas la esprimon „lingva imperiismo”. Tio esence estas sufiĉe naturo afero, ĉar ĝuste tiu starpunkto kondukas al la elekto de esperanto kiel unu ilo por malhelpi tiun lingvan imperiismon. Tamen ĉi eksplicita deklaro estas paŝo preskaŭ hontinde malfrua. La deklaracio ankaŭ diras la jenon: „La lingvo estas realaĵo intime ligita al aliaj sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.” Jes, ankaŭ tio ŝajnas raciā. Sed ĉu tio ne povas konduki al novaj kaj pli gravaj konkludoj? Ni pripensu. TEJO estas kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo. Do, TEJO devas subteni - aŭ almenaŭ aprobi - la agadojn de diversaj popoloj kontraŭ tia lingva kaj kultura imperiismo. Ekzemple la batalon de la kurdoj por rajti uzi sian lingvon. Aŭ la malmulte organizitan opozicion de la montaraj indianoj de Peruo, kiuj i.a. deziras egalajn rajtojn por sia keĉua lingvo. Sed por la kurdoj kaj la peruaj montaranoj la lingvo ne estas la plej grava afero. Ili kontraŭas ne nur la imperiismon lingvan, sed tiun saman imperiismon kiam ĝi montras siajn vizaĝojn ekonomian, socian, politikan kaj militaran. Ili deziras egalecon ne nur lingve, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj rilatoj. Iliaj „... aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.”

La deklaracio de Tyreso do montras, ke batalante kontraŭ lingva imperiismo oni samtempe faras „socian aktivecon”, t.e. oni batalas ankaŭ kontraŭ

ĉia alia imperiismo. La deklaracio nerekte diras, ke TEJO malaprobas imperiismon en ĉiu ĝia formo. Por eviti miskomprenojn oni preferus ke tio-ĉi estu klare deklarita. Ne analizinte la deklaron oni ja povus ekhavi la impreson, ke TEJO kontraŭas imperiismon nur lingvan, sed estas indiferenta rilate al ĉia cetera imperiismo!

Stono

EN NOVZELANDO

Ni aŭdis pri la neceso laŭte varbi Por „Kontakto” kaj ni ja tion faras, NZEA kaj EJANZ trovis monon por pagi abonon al ses gejunuloj. Ankaŭ ni reklamas inter la plenaĝuloj. Bedaŭrinde la infanoj, kiuj lernas esperanton en niaj lernejoj, ne atingas la nivelon por profiti el „Kontakto”. Mi ne scias ĉu Vi korespondas kun iuj aliaj novzelandanoj do mi donas kelkajn novaĵojn. Lastatempe aperis ĉe ni disko pri la prononcado. En la lernejoj preskaŭ 1000 infanoj lernas esperanton, multaj el ili dum oficialaj horoj. Kristnaske la junularo (EJANZ) organizis la unuan tendaron en la Norda Insulo kun 20 partoprenantoj. Poste en kvar urboj okazos kursoj por la instruistoj. Ni tre ĝuas „Kontakton”, speciale la humorajn rakontojn.

Stefan MacGill
34 Mona Vale Ave,
Christchurch 1
Novzelando

ESPERANTO EN


CLERMONT FERRAND

La Filozofia-Filologia Fakultato de la Universitato de Clermont Ferrand enkondukis esperanton kiel nedepigan ekzamenan fakon en la unua studjaro. Ĝi estas la unua fakultato en Francujo, kiu agnoskas esperanton kiel ekzamena fako kaj ĝin enkondukas en sian ekzaminsistemon. Pli ol 70 studentoj vizitas la kurson du horojn ĉiusemajne sub la gvidado de Prof. dro Pierre Janton.

SENDU ESPERANTAJOJN

Mi estas korea studento pri juro, 18 jara, kiu eklernis esperanton antaŭ 3 jaroj. Nun mi estas prezidanto de Stelo-Amika Klubo, kiun mi mem fondis. Ni volas fari propagandon, sed bedaŭrinde mankas al ni esperantaĵojn. Ni volas organizi ekspozicion. Bonvolu sendi iujn fotojn, sonbendojn, gazetojn, eĉ la portretojn de dro Zamenhof, librojn. Ĉion sendu laŭ la adreso de fraŭlino Ingrid Carlsson, Linderbergsgatan 4, S-842 47, Sundsvall, Svedujo. La tutmondaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj varme amas la internan ideon de Lolo Zo.

Glumarko de Junularo Esperantista de Nord-Ameriko.



Ni estas neŭtralaj rilate al la sociaj problemoj.

Fot. Z. Blazejczyk


MIRANDAJOJ DE LA MONDO

Sub tiu ĉi titolo ni aperigados unuopajn fotojn prezentantajn speciale vidindajn objektojn de la mondo. Se Vi konas la lokon,





kiu laŭ Via opinio estas nepre montranda al niaj legantoj bonvolu ĝin fotoj kaj la foto-grafajon sendi al la redakcio de Kontakto, Warszawa, Garwo-

linska 14/64.

La supra foto prezentas fragmenton de la maŭzoleo de Saĥ-i Zinda en Samarkanda, Uzbekistano (Sovetunio).



MOZAIKÓ



ARVID

KOLEKTU LA ELDONSERION

ORIENTO-OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA STONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REGO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita. 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando